他已爲所愛。 他已爲所見。 我以書借彼但彼今日已還我。 他以文錢給乞者。 童子在學堂但其妹在禮拜堂。 英人居英國意人居意國。 我見各國人於北京。 倫敦爲世界大城。 倫敦居民有一千萬。 倫敦商業爲全球之冠。 汝到英國否。 我到英國兩次。 他所有之錢三倍於我。 他錢之二分之一爲盜所劫。

字 彙

Plori	哭泣.	Spite	反之.
Spari	小心.	Tia, kia,	如此.
Suferi	受苦.	Uzi	用.
Sukcesi	做成.	Okazo	遭際.
Peni	誠.	Violono	四弦琴.
Venĝi	復仇.	Violonêlo	四弦琴.
Savi	救.	Pra	(如曾祖之曾)曾
Peli	逐出.	Nepo	孫.
Marŝi	行軍.	Regimento	聯隊.
Ĥemio	化學.	Soldato	兵.
Drogo	藥料.	Okupi	佔據.
Deŝiri	裂開.	Urbo	城.
Pantalono	袴.	Pacienco	忍耐.

Paŝo post paŝo, 步步.

Tago post tago 日日.

Per malmultaj vortoj, 數字之中.

Post malmultaj tagoj, 數日內.

第二十五課

Mi estos amanta. Li estos skribanta. Ni estos leganta.

Ŝi estos ploranta. Li estos aminta. Vi estos ŝparinta.
 Ili estos malŝparintaj. Mi estos suferinta. Ili estos sukcesantaj. Ni estos penontaj. Li estos trinkonta la vinon.
 Mi estos amata. Li estos nomata. Ŝi estos trompata.
 Ĝi estos trovata. Ŝi estos amita. Vi estos venĝita. Li estos benita. Li estos malbenita. Mi estos amota. Ili estos savotaj. Vi estos forpelotaj. Li marŝis paŝo post paŝo.
 Okulo, okulisto. Ĥemio, Ĥemiisto. Drogo, drogisto. Mia frato havis deŝiraĵojn en sia pantalono. Li forinis spite mi. Mi donis al li la libron tian, kia ĝi estis. Mia onklo estas riĉulo, sed mi estas malriĉulo. Mi vidis belulon kaj belulinon en la teatro. Mi penos fari uzon el la okazo.
 Mi rakontos al vi la historion per malmultaj vortoj. La violonisto amas sian violonon, sed la violonĉelisto ne ŝatas sian violonĉelon. La infano disverŝis la inkon sur mian naztukon. Skribisto ne verkas librojn, li transskribas paperojn; sed verkisto verkas librojn, libretojn, k. t. p. La provincestroj de tiuj ĉi provincoj estas maljustaj. La filoj, filinoj, nepoj, nepinoj, pranepoj kaj pranepinoj de reĝo estas reĝidoj. La regimentestro kaj la soldatoj de la regi-

mento okupos la urbon. Estu bona, kaj havu paciencon,
Pardonu! al mi, mi pŝtas, sinjoro.

第二十六課

我方寫。他方愛。他(女)方唱。我將愛。他將寫。
他們方遊玩。我已吸。他已舞。他方注意。(電
信): (1). 請速來約翰死禮拜日安葬。 (2). 我拜一
晚九鐘到請備一屋二床。 (3). 恭祝壽誕。牧師愛
其子因其子賢但輕視其弟因其弟愚。德人丹人俄
人居住英國爲英國居民但非英國人。老寡婦愛其
女孫。以匙與我開門。我們以剃刀剃頭以小刀割
紙以鎌刈禾。

字 彙

Pasi	過。	Vanta	輕浮。
Kelnero	候者。	Apud	近。
Pipro	胡椒。	Saŝa	滿足。
Salo	鹽。	Sen	未有。
Ferko	肉叉。	Senutila	無用。
Sano	健壯。	Leciono	課。

Kuri	趨.	Parkere	由心.
Volumo	本.	Perdi	失
Ŝajni	似.	Ŝati	歡喜.
Flugi	飛.	Demeti	革除.
Naĝi	泳.	Surmeti	放入.
Ranpi	匍匐.	Ventroparolisto	象聲者.
Fremdulo	外國人.	Tranĉileto	小刀.
Koncesi	承認.	Ŝekvi	跟隨.
Kulpo	罪過.		

Ju pli — des pli, 愈 — 愈.

Tiom, kiom, 如此多.

第二十七課

Pasigu al mi la akvon, mi petas. Kelnero, pasigu al mi la pipron kaj la salon. Kiam mi estis tie, mi vidis krabinojn ĉe la pordego. Alportu al ni tiuj forkoj. Mi vilas multe da homoj en la strato. Li parolis al mi pri mia sano, kaj mi estas tre danko al li. Ju pli mi ĝin legas, des pli mi ĝin ŝatas. Tiuj ĉi libroj estas vantaj kaj senutilaj. Li lernas sian lecionon, sed ŝi ĝin ellernas. Tiu ĉi

skatoleta enhavas miajn leterojn. La lernejestro kaj la lernanto estas en la lernejo. Hundoj forkuras, birdoj forflugas, fiŝoj fornaĝas kaj rampaĵoj forrampas. Mi estas fremdulo en fremda lando. Ŝi aĉetas tiom da libroj kiom mi. La knabo konfesis la kulpon kaj ploris tre laŭte. Li lernu parkere la lecionon. Lia ludo estis tre bona, sed li perdis sian tutan monon. Respondu al mi kaj diru al mi la tutan veron. Demetu vian ĉapelon kaj sidigu. Sumetu vian surtuton kaj fornu de tie ĉi. Mi vidis ventroparoliston hieraŭ en la teatro. Mi trovis tranĉileton sub la tavolo. Pasigu al li la libron, kiu estas apud vi. Li prenu tion, kion li bezonas. Jen estas la libro, mi sendos al vi la sekvantan volumon morgaŭ. Ili manĝadis ĝis sato. Vi ŝajnas ĉiam bela al mi, patrino mia! La infano manĝis la restaĵon de la kuko, kaj tial li ridis.

第二十八課

化學,化學師. 眼,眼簾. 我在戲園見了一對佳人及才子. 聯軍之將官兵士將據此城. 我在彼時我見過一小女在門. 我見街頭許多人. 讀愈多其味愈

無窮。我的信在此箱中。教習學生在講堂。犬走鳥飛魚遊蛇爬。他買許多書與我同。他的遊戲甚好但失了他的銀子。

係屬字用法

1. La amiko vin helpas.
Mi havis ian ideon kiel ĝin fari.
2. Tal li subite forlasis Londonon.
3. Kiun ajn vi povas min viziti, estos konvene al mi.
Venu hodiaŭ, ar iam morgaŭ estos tro malfrue.
4. Mi ne povis trovi mian libron ie en la ĉambro.
Ĉu vi metis ĝin ien ?
5. Tel li sukcesas en ĉio.
6. Ies perdo ne estas ĉiam ies gajno.
7. Io estis sub la tablo, sed mi ne povis vidi ion tie.
Morgaŭ mi sendos al vi ion belan.
Li vidis ion kion li tre amis.
8. Mi iom komprenas tion, kion vi volas diri.
La vetero estas iom pli varma.
9. Ĉu iu estas tie ?

Mi ne vidos jun tie.

10. Ĉiu aĝo lavas siajn dĉvojn.

Mi konis ĉiun viron, kiun mi renkontis.

11. Kial vi silentis ?

Ĉial tio estas la plej bona.

12. Mi ĉiam respondas al viaj leteroj.

Ĉiam skribu legeble.

Ĉiam sendu al mi, se vi estas malsana.

Ĉiam pripensu antaŭ ol vi parolas.

13. Ĉie mi trovis amikojn.

Akvo, akvo ĉie, sed ĉe ne unu akvero por trinki.

14. Ni helpas la lernantojn ĉiel.

15. Ĉies ideo estis diversa.

16. Ĉio havas lokon propran, tial metu ĉion en ĝian propran lokon.

17. Ĉio kion mi havas estas ankaŭ via.

18. Preskaŭ ĉiu amas sin mem.

Mi legis ĉion zorge, antaŭ ol mi ĝin sendis al li.

El ĉiuj miaj amikoj, li estas la plej bona.

Ŝi legis ĉiun libron, kiun ŝi povis ricevi.

19. Kia lingvo ĝi estas !

Kian leteron vi skribis ?

Kiaj ĉarmaj in'anoj estas viaj !

Kiajn belajn librojn mi legis.

20. Kial vi ne skribis al li ?

Kial vi ne venos al nia kunveno ?

21. Kiam ni iros Londonon ?

Kiam ni estos finintaj nian laboron

22. Kie estas la poŝt-oficejo !

23. Kiel vi elparolas "aŭ" ?

Kiel "ow" en la angla vorto "cow."

24. Kies libro estas tiu ĉi ?

Kies plumon vi uzas ?

Mi vidis kampon en kies mezo staris du arboj.

25. Kio iras rapide ? La tempo.

Kien li volis irontri al vi ?

26. Kiom da ĉevaloj estis tie ?

Kiom kostas tio ?

Je kioma horo vi venos al mi ?

27. Kiu parolas Esperanton ?

Kiu estos tie ?

Kiuj estas la tagoj de la semajno ?

Kion vi bezonas ?

La libroju, kiujn vi pruntos al mi.

28. Nenia antaŭa sperto estas necesa.

Mi estis havinta nenian antaŭan sperton.

29. Li nenial ĉesis skribi al mi.

30. Neniam ? Estas longa tempo.

Mi neniam skribas longajn leterojn.

Mi neniam aĉetas malkarajn librojn.

31. Nenie, oni min komprenis.

Nenie oni povis trovi mian lundaon.

32. Ŝi neniel povis kompreni tion, kion li skribis en alia lingvo.

Sen Esperanto li neniel povis komprenigi sin.

33. Ies devo estas nenies.

34. Nenio estas preta.

Ĉu vi havas nenion por diri al mi ?

35. Li havas neniom.

36. Neniu estis apud la pordego.

Neniu parolas al mi.

Ĉu vi neniun vidis tie kiun vi konis ?

Mi neniun vidis ĉe vi.

37. Tia ripetado enuas min.

En tiaj okazoj, ĉiam mankas io.

Mi neniam vidis tian altron.

38. Ĉar li ne respondas al vi, ne kredu, ke li ne volas

respondi; tial mi al vi konsilas skribi li.

39. Tiam ni povos iri al la kunveno.

Mi vizitos vin tiam, kiam vi estos preta.

40. Tie vi trovos multe da amikoj.

Mi iros tien, kiam mi ricevos vian leteron.

Miaj amikoj loĝas tie ĉi.

Ĉu viaj fratoj venos tien ĉi ?

41. Se estus tiel, vi devus skribi al li.

Mi sentas min tiel malĉeliĉa, ke vi devus reveni.

Kiam vi skribis tiel ?

42. Mi neniam prenas ties konsilon.

43. Ĉu vi parolas pri tio ?

Mi neniam aŭdis tion.

Tio ĉi estas malkredinda.

Vi devus memori tion ĉi.

44. Tiom estas malfacile memori.

45. Mi loĝis en tiu urĉo.

Ĉu mi montris al vi tiun leteron ?

Kie kreskas tiuj floroj ?

Ĉu vi ricevis tiujn librojn ?

Tiu ĉi ringo estas por vi.

Mi neniam forgesos tiun ĉi reguon.

Tiuj ĉi hundoj estas tre grandaj.

Mi aĉetos tiujn ĉi librojn.

係屬字表

(稱代字,區別字,疏狀字,並結合疏狀).

性 質	ia 某 種	ĉia 各 種	kia 何 種	nenia 無	tia 此 種
緣 故	ial 有 故	ĉial 諸原因	kial 何 故	nenial 無 故	tial 故
時 候	iam 隨 時	ĉiam 常 時	kiam 何 時	neniam 永 無	tiam 彼 時

地 位	ie 隨 處	ôie 處 處	kie 何 處	nenie 無 處	tie 彼 處
樣 子	iel 不 論 如 何	ôiel 都	kiel 何	neniel 都 無	tiel 如 此
所 有	ies 某 的	ôies 人 人 的	kies 誰 的	nenies 無 人 的	ties 彼 的
事 物	io 些	ôio 事 事	kio 何 物	nenio 無 有	tio 彼 物
分 量	iom 如 許	ôiom 全	kiom 若 干	neniom 未 有	tiom 許 多
指 人	iu 某 人	ôiu 人 人	kiu 誰 人	noniu 無 人	tiu 彼 其

注意：上表當熟讀以便隨時運用。下四行均由頭一行變化而成其法如下：

Ô, 前係指凡最之意。

K, 前係表發問及係屬之意。

Nen, 前係表否定之辭。

T, 前係表指事之義。

第三篇 會話

Bonan tagon sinjoro.	日間相遇或相離之請安語。
Kiel vi fartas ?	你好呀。
Tre bonz, sinjoro, mi dankas vin.	}都好,費心。
Mi ĝojas ke mi vin vidas en bona sano.	}我見貴體康健喜甚。
Vi estas tre ĝentila.	費爾心。
Al ni estas varme.	我們是溫暖。
Al ili estas malvarme.	他們是寒冷。
Mi malsatas.	我餓了。
Li tre soifas.	他渴甚。
Kia estas la vetero ?	天氣如何。
Ni havas belegan tagon.	天氣很好。
Tiom pli bone.	以多為妙。
Kiu frapas? Kiu estas tie?	誰呀。誰在那兒。
Estas mi. Malfermu.	是我。開。
Envenu. La ŝlosilo estas en la seruro.	}請進來。鑰匙在鎖中。
Vi estas prava. Li estas malprava.	}爾不錯。他錯。

Pii bone estas agi malfrue ol neniam,	} 雖遲猶,強不做.
Sidiĝu, mi petas.	請坐.
Mi vin petss sidiĝi.	請坐.
Mi tie estos tiel baldaŭ, kiel vi.	} 我即到該處.
Vi vin trompas, ne povas, esti.	} 此乃難事吾子自欺耳.
Mi vin certigas, ke jes.	我確實告爾如此.
Vizaĝo kontraŭ vizaĝo.	覷面.
Brako ĉe brako.	並臂.
Koro ĉe koro.	心心相印.
Mano en mano.	携手.
Donu al mi vian manon.	授我以手.
Kion vi diras pri tio ?	爾以爲何如.
Vi povas kredi al mi.	爾當信我.
Mi estas certa je tio.	我誠然.
Ne, ne estas eble.	否,不能.
Ĉu vi konsentas al tio ?	爾允許否.
Jes, certe kun plezuro.	然,甚贊成.

- Vi alvenas ĝustatempe. 汝來恰好。
- Vi jam diris tion ĉi trifoje. 汝已說過三次。
- Li venis nur unufoje. 他只來一次。
- Ekbruligu la fajron, la k- }
 ondelon. } 燃洋蠟。
- La fajro brulas malbone. 此火難燒。
- Mi bezonas inkujon. 我要墨盒。
- Ĉu vi min komprenas ? 會意否。
- Jes, sinjoro, mi vin kom- }
 prenas. } 然我會意。
- Kial vi ne respondis ? 何以不答。
- Mi ne aŭdis tre bone. 我聽不明白。
- Ni laboru kaj esperu. 許我。
- Mi atendas viajn ordonojn. 謹候台命。
- Via ideo estas tre bona. 尊意甚好。
- Mi kredas, ke vi faros lo- }
 ne. } 我知爾必成事。
- Kion vi bezonas ? 汝要何物。
- Mi bezonas kandelingon. 我要燭臺。
- Nenion mi bezonas. 我不要。

- Jen estas teo, prenu iom } 茶在此請喝。
da ĝi.
- Mi havas cigarojn. ĉu vi } 我有呂宋煙爾要否。
deziras iom ?
- Ĉu vi havas monon ? Mi } 爾有錢否。我有。
havas.
- Ĉu vi volas lakton aŭ kr- } 要牛乳及乳酥否。
emon ?
- Mi preferas kremon, 要乳酥。
- Kiom kostas tiu ĉi objekto ? 此物值多少錢。
- Ĝi kostas dek ŝilingojn. 值十先令。
- Kien vi iras tiel rapide ? 將趕往何處。
- Nenien (mi iras). 不往何處。
- Kian aĝon li havas ? 他多少歲。
- Li havas dek ok jarojn. 他十八歲。
- Li estas maljunulo de ses- } 他乃六十歲老人。
dek jaroj.
- Antaŭ unu semajno, antaŭ } 一禮拜前,一月前。
unu monato.
- Post du horoj, post ok tagoj. 兩點鐘,一禮拜。

- Kion vi farus, se vi estus }
mi ? } 如爾處我之地爾將何爲.
- Mi ne scias kiel vin danki }
per la granda servo. } 躬沐深恩未知將何以報.
- Kia estas via opinio ? } 尊意如何.
- Mi ne Scias bone. } 我不甚明白.
- Kiam ni haltos por mate- }
nmanĝi ? } 我等何時停工用早饈.
- Post unu horo ni estos en }
la stacidomo. } 一點鐘已過我們將到車站.
- Rigardu la maljunan sinj- }
ron, kiu legas. } 視彼老人他方念書.
- Tiu, kiu havas la harojn }
nigrajn ? } 誰有黑髮.
- Jes, kian aĝon li havas ? } 是,他幾歲.
- Li havas ne malpli ol okd- }
ek jarojn. } 他不下八十歲.
- Ili estas nur tri aŭ kvar. } 他祇三四個.
- Ŝi estas tre kolera. } 他怒甚.
- Jen li kantas, jen li ploras. } 他時唱時哭.

Sendu lin al mi kiam ajn } 他不論何時到帶他來。
li venos.

Kiu estas en la domo ? 誰在此屋。

Kian tempon de jaro vi } 一年中汝喜歡何時。
preferas ?

Kia ĉarma infano ! 此兒何其可愛也。

Kia bela domo ! 美哉此屋。

Li ne povas trovi la vort- } 他找不出字典來。
aron.

Ĉu li fumas ? 他吸煙否。

Mi lin konas fame. 我知其名望。

Fermu la pordon. 關門。

Ŝlosu la pordon. 鎖門。

Kiam li alvenos ? 他何時來。

Mi havas ion por diri al vi. 我有某事與你說。

Ni havas multe por fari. 我們有許多事。

Mi venos la lundon plej p- } 下禮拜一我將來此。
roksiman.

Li mortis la lastan ĵaŭ- } 他前禮拜二死了。
don.

Estas du infanoj en la ĉam-
bro apuda. } 有二小孩在隔屋.

Pasigu al mi la panon, mi
petas. } 隨便與我麵包.

Pasigu al mi la mustardon. 給我芥末.

Pasigu al mi la salaton. 給我生菜.

Kelnero, donu al mi la a-
kvon. } 侍者來水.

En Restoracio.

Kelnero, ni volas tagmanĝi, sed se estus eble, en loko senbrua, ĉar mi ne amas manĝi surdigata per la rulado de la veturiloj kaj per ĉiuj bruoj de la strato. Tie ĉi ni estas kvazaŭ ekstere.

La sinjoroj povus sin meti en kabineton apartan, sur la unuan etaĝon, ĉe la flanko de la korto; ili nenian bruon aŭdis tie.

Nu, jes; ni estos almenaŭ pli trankvilaj ol tie ĉi. Montru al ni la vojon, kaj servu al ni rapide ĉar mi mortas de malsato. Vi ŝanĝos la tablotukon, tiu ĉi ne estas tre pura.

Ho mi ĝin tuj ŝanĝos. Kiom da manĝilaroj ?

Tri, ĉar ni atendas iun, li eĉ devus jam esti alveninta. Nu, ni legu la karton de la manĝaĵoj. Supoj serviandaj: vermiĉelo en lakto, okzala supo, supo Parmentier (terpoma), tapioko en lakto, supo fazeola. — Viandaj supoj: buljono kun makaronoj, tapioko en buljono, ĵuiĉono (buljono kun diversaj legomoj), konsomeo, supo testuda.

Mi ne manĝos supon. Diru al mi kion oni skribis pri fiŝoj.

Ni povas havi: salmon, truton, haringon, karpon kaj ezokon.

Mi volonte manĝus angilon; sed ĉar la karto ĝin ne proponas, ĉu ni ne povus konveni per ostroj ? Se vi volas supon, vi ĝin manĝos poste.

Jes, mi aprobas, ni prenu ostrojn kun bona botelo da vino el chablis.

Decidite mi ne manĝos supon. Ni elektu ian viandon. Jen: bovaĵo rostita aŭ rosbifo, bovaĵo bolita, bovaĵo kun okzalo, renoj de ŝafido, bifstekoj, kotletoj de ŝafido, de ŝafidato, de bovido, de porko; femuro de ŝafido (rostita aŭ

polita), kapo de bovido kun saŭco vinagra. ŝinko el Jorko, viandoj malvarmaj.

Kaj pri kortobirdoj ?

Meleagrino rostita, ansero kun kaŝtanoj, kokino kun rizo, maso kun olivoj, kokido rostita.

Nu, mi prenos renojn de ŝafido post la ostroj.

Mi aukaŭ. Kelnero, ĉu viaj porcioj estas dikaj ?

Ho, jes, ŝnoro, unu tre sufiĉas por du personoj.

Se ni prenos ian legomon post la renoj; kion vi diros pri tio ĉi ?

Volonte; ni vidu la legomojn. Estas sur la karto: pureo le terpomoj; flora brasiko kun olco; pizetoj france kuirita; asparagoj kun blanka saŭco; spinaco kun viandsuko, terpomoj, frititaj.

Mi rimarkigas al vi, kara amiko, ke ĝis nun ni ĝuste elektis nur du manĝaĵojn: la ostrojn kaj la renojn de ŝafido. Ŝajnas al mi ke vi alkondukas nin iom tro rapide al la legomoj. Ĉu ni ne povus preni ovojn post la ostroj, ĉar ni ne manĝos supon ?

Jes, vi estas prava; sed ni komencu atakante la manĝaĵ-

etojn kiuj estas sur la tablo; pasigu al mi la raŝanojn, mi petas. Mi ne povas pli atendi. Vi ne prenas ion da ili!

Ne, dankou; mi preferas la olivojn. Nun, se ni decidus la demandojn pri la ovoĵoj, kiel vi amas ilin?

Ho! en ĉiuj manieroj: en la ŝelo, maŝmolajn, kumkoksitajn, platigitajn, poŝumitajn, frititajn.

Sed ĉu vi amas ovaĵojn?

Ho, jes, multe.

Ĉu ni petus pri unu?

Tre volonte; ni prenu ovaĵojn kun herbejoj post la ostroĵoj.

Ni do havas la ostroĵojn, la ovaĵojn kun herbejoj kaj la renojn.

Jes, nun ni bezonas legumojn, Mi proponas verdajn fazzeolojn.

Tre bone, mi amas ilin multe. Sed ion da ĉasaĵo ne malplaĉas al mi poste.

Kian strangan menuon ni kombinas tiel! Kio estas notita sur la karto pri ĉasaĵo?

Leporo rostita, perdriko kaj fazano.

Mi elektas perdrikon, ĉar mi manĝis leporon bieraŭ kaj

mi havas abomenon por la fazano.

Nu, mi imitos vian ekzemplon. Sed ŝajnas al mi ke, poste, iom da saloto estos necesega.

Nu, elektu ni vnu.

Kelnero, kiajn salatojn vi havas ?

Latukon pomforman, latukon romanan endivon, leontodon, ducelon.

Pri La Temperaturo, La Sezonoj Kaj La Monatoj.

Inter la dekdu monatoj, el kiuj konsistas jaro, kiun vi preferas ?

Unue vi devus demandi min, ĉu mi pliamas la varmon aŭ la malvarmon; ĉar kompreneble, mi devos elekti monaton printempan, someran, aŭtunan aŭ vintran, konforme je mia prefero.

Diru do al mi kian temperaturon vi plivolas. La sekau aŭ la malsekan ? la varman aŭ la malvarman ? la varmegan aŭ la glacian ?

Vi mokas min, kara mia. Sed mi senŝerce diros al vi, ke el ĉiuj sezonoj de jaro mi preferas la printempon kaj la majan monaton. Marto estas ofte iom malvarma, ŝanĝ-

oma, venta, pluva. Aprilo apenaŭ komencas montri al ni la unuajn fidetojn de la suno. Sed en Majo vere reviviĝas la naturo: la arboj malfermas siajn burĝonojn, kovras sin per folioj kaj floroj; unuvorte ĉiuj kreskaĵoj kaj vegetaĵoj ĉarmas la rigardon, parfumas la aeron kaj ĉirkaŭ si disdonas impreson de vekigo kaj ĝojo.

Ho liel poeta vi estas! Sed kelkfoje la maja monato estas tre diferenca de la bela pentro, kiun vi faris pri ĝi. Oni ofte devas atendi ĝis Junio, por vidi la naturon sub la brilaj kolcroj, kiujn al ĝi vi alskribis.

Jes, mi ĝin konfesas. Sed en Majo oni ricevas pli fortan sentaĵon de aliformiĝo kaj renaskiĝo en la naturo.

Kontraŭe mi preferas la dormadon de la naturo, ĝian iajn mortintecon dum la vintro. Ĝi tiel respondas pli bone al mia karaktero malĝoja kaj melankolia. Mi amas longe revadi, promenante tra la nudigita kamparo, kovrita per ĝia mantelo de brilega neĝo. Estas por mi plezuro rigardi sur la vitrojn de mia fenestro la mil figuraĵojn sur ili desegnatajn de la ĝivro. Kiam mi trairas la senbrtajn arbarojn, ŝajnas al mi, ke ili fariĝis silentaj por ne mal-

elpi al mia revado.

Se la pluvo falas, la vento blovas, fajfas kaj furiozas, mi restas hejme, kaj atendas pacience la ĉeson de la pluvo, la kvietigon de la vento, sidante apud la fajro kaj fumante bonan cigaron aŭ cigareton kaj eĉ kelkfoje bonegan pipon.

Alivorte vi evitas la pluvon kaj la venton de la vintro, sed vi amas la neĝon kiu vin frostigas ĝis la ostoj, la harkleton kiu vin blindigas, la ĝivron kiu falas de la arboj kaj blankigas vin kiel faruno, fine la glacien kiu faras vin gliti je ĉiu paŝo. Mi ne kalkulis, la plezuron konstante tremadi aŭ sin kovri tiamaniere, ke oni ne povas pli movi sin. Mi ankaŭ forgesis la ĝojon eniĝi en la koton ĝis la malecoj, post forta pluvego.

Kaj vi, Ludoviko! Vi diras nenion. Kian tempon de jaro vi preferas?

Ho mi! mi havas guston tute diferenca de la via: la printempo ne plaĉas al mi pro sia karaktero ŝanĝanta. Dum tiu sezono, oni scias neniam, ĉu oni devas preni la pluvombrelon aŭ la bastonon. La moratojn Novembron,

Decemtron, Januaron kaj eĉ Februaron mi ne ŝatas, tial ke mi pli ol ĉion malamas la malvarmon. Ĝi malvigligas kaj paralizas la spiriton. De alia flanko, la somero ne plaĉas al mi pli multe. En Julio kaj Aŭgusto, la varmo faras vin senzorga kaj maldiligenta; oni perdas ĉiun agemon:

Mi preferas la aŭtŝnon kaj la du monatojn Septembron, Oktobron. En ili la vetero estas pli konstanta, la temperaturo pli agrabla kaj mezgrada. Oni ne timas ĉiam vidi siajn projektojn mallelpatajn de ia pluvego aŭ fulmotondro, kiel en la printempo kaj en la somero.

Dum la aŭtuno, vi povas vojaĝi en trankvileco; la marŝo estas plezuro kaj nenian malutilon prezentas la ripozado ĉe la naturo. Kontraŭe, vi riskas ricevi sunŝrapon se, en la somero, vi restadas sub la radiado de la suno, aŭ pneŭmonion, en la vintro, se vi haltadas kelkan tempon ekstere.

Sed vi kantis la indon de tiuj sezonoj. Permesu do ke mi pledu por la printempo, montrante ĝiajn ecojn.

Se ni komparas la sezonojn kun la vivo de la homo, ni trovos ke la printempo respondas al la infanco. Agrabla,

ĉarma kiel tiu ĉi, la printempo havas ankaŭ ĝian kaprican kaj ŝanĝeman humoron: jen ridoj, jen ploroj senatendaj.

La somero respondas al la aĝo de la pasioj. La naturo tiam estas plena per elektro kaj fajro, kiel la vejnoj homaj en tiu periodo de la vivo: ĝi estas la tempo de la fulmotondroj kaj de la grandaj katastrofoj.

Pli certa, pli kvieta, pli mezura, la aŭtuno figuras la maturecon en la vivo. Ĝi ne estas la sezono de la floroj plej brilaj, sed ĝi estas la tempo de la fruktoj plej belaj kaj plej bongustaj. Persikoj, piroj, pomoj kaj vinberoj ĝojigas la vidadon kaj flatas la gustadon.

Se la verdeco de la arboj ne estas tiel freŝa kiel en la printempo, ĝi prezentas pli grandan riĉecon da nuancoj. La naturo ne uzas pli unuforme la verdon, ĝi prenas aliajn kolorilojn sur sian palettron kaj miksas la flavon, la ruĝon kaj eĉ la brunon kun la verdeco de sia ĝistiam pentraĵo.

La akro pli seka ol en la printempo, pli pura kaj malpeza ol en la somero, ne malvarma kiel en la vintro, estas multe pli saniga ol en la aliaj sezonoj.

Pro tiuj diversaj motivoj mi alskribas la superecon al la printempo.

Por Saluti Kaj Demandi Pri La Sano.

Mi deziras al vi bonan tagon, Sinjoro :

Bonan tagon, Sinjoro, kiel vi fartas ?

Tre bone, mi dankas.

Oni diris al mi ke vi estas malsana.

Ho ne, dankoj al Dio; mi neniam sanis pli bone ol de kelka tempo; se tio ĉi daŭriĝos, la kuracistoj ne gajnos multe de mi.

Benadu la ĉielon, ĉar la sano certe estas la plej grandvalora bono el ĉiuj. Se vi estus kiel mi en konstanta malsaneco, vi ankoraŭ pli multe ŝatus vian feliĉecon. Sed kiu venas tie, laŭante kaj apogante sin sur bastono? Ĉu ne estas nia amiko B. ?

Jes, estas li. La mizera rompis al si kruron antaŭ du monatoj kaj li marŝas ankoraŭ pene.

Bonveno al vi, amiko; mi ĵus sciigis la malfeliĉon, kiu okazis al vi. Kiel vi sanas nun ?

Vi estas tre aminda. Nun mia stato estas pli ĝena ol dolora; sed, en la unuoj tagoj, mi suferis terure.

Ĉu via ĉarma familio estas en bona sano ?

Mia edzino ĉiam havas sian feran sanon, sed unu el miaj infanoj kaŭzas al mi grandan maltrankvilecon; de kelkaj tagoj, ĝi havas mienon tre malbonan, ĝi havas pli appetiton kaj ĉiam plendas pri kapdoloroj.

Ha! kiu do el ili ?

La plej juna. Ĝis nun ĝi estis tute sana kaj eĉ tre forta kompare kun sia aĝo.

Eble tio ĉi venas nur el tro granda kresko. La kreskado tre lacigas la infanojn kaj faras ilin pli malpli surferantaj, malsanetaj.

Tiuj ĉi estas precize la aferoj, kiujn al mi mem mi diras por trankviliĝi; sed malgraŭ ĉio mi ne povas defendi min de kelka timo.

Estu pli saĝa kaj ne vidu danĝeron tie, kie nur estas afero natura, otats momenta kiun venkas ordinare ĉiuj infanoj sen ia el la komplikajoj, kiujn al si kreas via fantazio temigita.

Tion ĉi vi diras por trankviligi min kaj mi estas al vi tre danka pro ĝi, sed ĉar vi mem estas patro, vi certe komprenas ke viaj vortoj ne konvinkas min tute.

Nu, adiaŭ, amiko, faru mil salutojn al via frato, je mia nomo; salutu vian patron de mi kaj prezentu mian respektan submetiĝon alvia patrino.

Certe mi ĝin faros. De via flanko ne forgesu revoki min al la memoro de viaj gepatroj.

En Vojaĝo kaj En Serĉado De Loĝejo.

Rigardu do, Henriko, kian belan vidaĵon prezentas tiu kastelo, sidanta sur la supro de la monteto antaŭ ni. La senfrukteco de la pejzaĝo, la krutaĵoj, kiujn ĝi superas kaj la ŝtonegoj sur kiuj ĝi staras, donas al ĝi eksteron de for-eco kaj majesteco tute imponan.

Ĝi estas efektive tre impona sed ne malpli malĝojiga. Por nenio mi vclus laĝadi en tiu nesto de aglo, tiom pli ke la kamparo ĉirkaŭanta ŝajnas al mi nek pli gajiga nek pli fruktodona ol la monteto mem. Sed ĉu oni volas kuŝigi nin tie ĉi ? certe de dek minutoj, ni restas sur tiu ĉi st-

acio.

Oni sendube atendas alian vagonaron, kiu devas pasi antaŭ la nia.

Mi kredas, ke efektive la rapida de Marseille (Marsej') atingas nin tie ĉi.

Sed kie ni haltos por manĝi ?

Ni haltos en N... , la bufedo estas tie tre bona, oni diris al mi.

Je kioma horo? ĉar mi tre vere mortas de malsato.

Vi tamen vespermanĝis kiel manĝegulo hieraŭ vespere.

Jes, sed de tiu tempo ni marŝadis.

Ho! marŝi tiamaniere ne estas tre laĝe.

Vi estas prava, sed kiam oni ricevas skuadon kiel ni dum ok horoj, oni digestas multe pli rapide.

Konsolu vin, nur unu duono da horo vi nun devas atendi.

Preparu vian biletan: mi ekvidas la kontroliston.

Ankoraŭ! tiu homo malhelpos do al ni konstante.

Tiu ĉi fojon, ne plendu; tio estas la signo ke ni atingas la celon.

Mi ne trovas mian kvitancon de pakajoj. Kien mi faris el ĝi? Ha! jen ĝi estas.

Ĉu vi elektis hotelon?

Ne. Oni rekomendis al mi la hotelon de la Poŝto, sed mi kredas ke ni agos pli saĝe, se ni decidis la aferon tiam nur, kiam ni estos mem esportintaj. Ni prenu veturilon kaj lasu la pakajojn en la stacidomo.

Ha! jen estas hotelo kiu ŝajnas al mi sufiĉe pura. Ĉu vi volas ke ni haltigu la veturilon?

Jes, ni malsupreniru.

Donan tagon, sinjorino. Ĉu vi povus luigi al ni ĉambron?

Certe, sinjoroj, kun plezuro. Mi tuj montros al vi tre belan ĉambron kun du litoj, aŭ, se vi preferos, du ĉambrojn apartajn.

Jes, du ĉambrojn apartajn sed komuniĝajn.

Ĉu vi deziras ilin kun vido sur la placon aŭ kun vido sur la korton internan de la hotelo? Kompreneble tiuj ĉi lastaj estas malpli karaj ol la aliaj.

Ĉar ni estos en la ĉambro nur nokte, la flanko sur la k-

orto sufiĉos al ni. Sed estu modera kaj ne tondu nin tro multe.

Ho! sinjoro, kion vi diras! Mi estas la plej modera el ĉiuj hotelistinoj.

Ĉi tiu ĉambro tre plaĉus al mi, se ĝi havus kabineton por la tuaĵeto.

Mi havas alian tute similan, kiu plentemas tiun kondiĉon, sed ĝi estas iom malpli hela.

Tio ne ĝenas min. Mantru ĝin al mi.

Jen ĝi estas, sinjoro. Ni povus loĝigi vian amikon en la apuda, kiu havas meblaron tute novan, kiel vi vidas.

Nu, tiuj du ĉambroj konvenas por ni. Je kia prezo vi kligas ilin?

Tio ĉi dependos de la tempo kiun vi pasigos tie ĉi, sinjoroj.

Se vi ne estos tro postulema, ni restos unu monaton, ĉar ni volas esplori tute bone la arbaron kaj la ĉirkaŭaĵojn.

Nu! vi pagos 12 frankojn ĉiu, por unu tago, se vi prenos la nutraĵon en la hotelo, kaj 7 frankojn, se vi ne ma-

nĝos tie ĉi.

Sed ĉu la luno kaj la servado estas kalkulitaj en tiu prezo ?

Jes. 12 frankojn por ĉiu tago. kalkulante ĉion. kun matenmanĝo. tagmanĝo kaj vespermanĝo. Sed ĉar la trinkaĵo de la lando estas cidro, se vi volos vinon. vi ĝin pagos aparte.

Bone; ni konsentas. Havu la bonecon prenigi niajn pakajojn el la stacidomo. Dume ni faros promeneton en la urbo.

Vizito.

Mi pensas ke oni sonoris. Johano, iru do kaj vidu kiu estas tie. De neniu mi volas akcepti viziton hodiaŭ.

Sinjinino, ĝi estas sinjoro F... kin insistas por esti akceptata. Mi diris al li ke la sinjinino estas Suferanta; sed li volas absolute ke mi avertu vin ke li havas tre gravan homunikon por fari al vi.

Nu! respondu al li ke mi tre bedaŭras, sed ke mi estas vere tro malsaneta por akcepti lin. Kun tiu ĉi balilulo mi estus malhelpata du horojn.

Bone. siujorino. mi tuj al li diros tion ĉi.

Nu! ankoraŭ ekbato de sonorileto. Oni do ne lasos min trankvila. Kiu kredoble venas ankoraŭ min ĝeni?

Ha! ĝi estas sinjorino B... Johano diru al ŝi ke ŝi eniru kaj enkonduku ŝin en la saloneton.

Bonau tagon, kara amikino. Kiel vi sanas en tiu vetero peza kaj sufokiga, kiun ni havas de du tagoj. Oni pensus ke oni estas en Senegalo.

Mi sanas tre bone, dankon. Presentu al vi ke mi benas ĝuste tiun ĉi temperaturon, pri kiu ĉiuj plendas, ĉar mi bone esperas ke ĝi baldaŭ liberigos min de forta malvarmumo, kiu min tenas de mia reveno el Parizo.

Kaj kie ĝi kaptis vin?

Ĉu iam oni scias kie malvarmumo kaptas iun? Mi tamen kredas ke tio okazis al mi en la teatro. Al mi estis tre varme kaj elirante mi ne sufiĉe kovrir min.

Oni neniam estas sufiĉe singarda. Sed kun tia vetero vi estos baldaŭ resanigita.

Mi jam venis por vin viziti; sed mi pensas ke neniu estis ĉe vi, ĉar mi sonoris, mi frapis la pordon almenaŭ dek

fojojn, ne atingante ke oni malfermu al mi.

— Kiun tagon vi venis ?

Tion ĉi mi ne memoras pli ĝuste. En la lasta lundo ve-
spere, mi pensas.

Je kioma horo ?

Je la duono de la sesa, se mi ne eraras.

Vi kredible, eraras, aŭ pri la tago, aŭ pri la horo.

Eble, cetero tio ĉi estas ne grava, ĉar mi vidas vin hodiaŭ
kaj en bona sano.

— Ĉu vi bone amuzis vin en Parizo ?

Mi, ho ! grandege, sed mia edzo, kiu nun amas nur la
kamaron, havis unu solan deziron: tien ĉi reveni kiel eble
klej baldaŭ.

— Kaj, kompreneble, por ne suferigi lin tro forte, vi revenis
pli baldaŭ ol vi volis.

Jes, sed en la edzeco oni devas havi la kuraĝon fari of-
eraĵojn unu al la alia. Kaj vi, ĉu vi ne intencas vojaĝi ti-
un ĉi jaron ?

— Jes, ni intencas iri al la bordo de la maro. Sed mi at-
endas ke mia filo estu eliri nta el la kolegio.

Ĉu vi estas kontenta je li?

Li estas bona knabo, kvieta, obea sed senenergia.

Vi estas eble tro postulema.

Ne, mi certigas al vi, sed veré li timas tro multe ĉion penon.

Kreskante li fariĝos pli kuraĝa kaj pli laborema.

Nul-kara amikino, mi vin lasas.

Kiel, vi jam foriras!

Jes, mi promesis ke mi estos reveniinta je la kvina horo, kaj estas jam la duono de la sesa.

第 四 篇 尺 牘

Parizo, la 1^{an} de Sep., 1901^a.

Kara Sinjorino,

Mi skribis al vi hieraŭ, sed mia letero kruciĝis kun la via. Mi tre volonte enskribigas vin inter la membroj adeptoj de nia societo. mi esperas ke vi faros ĉion kion vi povos por vastigi la karan lingvon inter viaj amikoj.

Kun amika saluto, Via,

Sinjorino C

D

Nov - Jorko, 3. 11. 1902^a.

Tre estimata Sinjoro,

Hodiaŭ mi ricevis la ekzempleron de du gazetoj, kiujn vi, aminde, sendis al mi. Koran dankon!

Tre fidele la via,

Sinjoro P

B

Jorko, 1902^a.

Kara Amiko,

Ĉiujn bondezirojn pri ĝoja Kristnasko kaj pri feliĉo kaj progreso en ĉiuj bonaĵoj en la nova jaro!

Kun kora saluto,

Sinjoro F

L

Berlino, 2^{an} de Nov., 1901^a.

Kara Sinjoro,

Mi resendis la artikolon kun traduko al la ĵurnalo per la poŝto foriranta je 11. 30 matene, kaj esperas ke ĝi alvenos ne tro malfrue por aperi morgaŭ. Mi ankoraŭ

ne scias detalojn pri la fondo de la nava societo.

Kore via,
V

Sinjoro D

—————
Londono, 15^{an} de Jan., 1901^a.

Estimata Sinjoro,

Mi volus vin viziti lundon, je la kvara horo post tagmezo, se tiu horo estus konvena al vi. Se mi ne ricevus respondon, mi estus ĉe vi je la horo nomita.

Kun salto.
N

Sinjoro M

—————
Dublino, 10^{an} de Junio, 1901^a.

Kara Sinjoro,

Mi treege deziras havi pruvon de la praktikeco de "Esperanto." Ĉu vi volas korespondadi kun mi per poŝtkartoj ilustritaj ? Per tiuj ĉi ni povus doni reciproke kelkajn detalojn pri la diversaj vidaĵoj de niaj du landoj.

Kun kora saluto,

Sinjoro F

O

 Madrido, 26^{an} de Novembro, 1902^a.

Estimata Samideano,

Permesu al mi prezenti mian gratulon pri via kurso.

Mi tre ŝatas vian manieron skribi, ĉiam uzante la estintan tempon de la verbo anstataŭ la estonta. Sendu al mi klarigojn pri via kurso Esperanta. Kie estas la kunveno, kiam ĝi fariĝas, kiu estas ĝia instruisto, kiom da lernantoj vi havas, k. c.

Sendu al nia gazeto artikolojn aŭ detalojn pri Esperanto, ni bezonas iom da ili. Mi petegas vin uzi nian gazeton kiel vian propran. Mi enmetos ĉion, kion vi sendos, ĉu Angla aŭ Esperanto.

Tute via,

Sinjoro

V

 Lisabono, 3^{an} de Oktobro, 1902^a.

Kara Sinjoro,

Mi sciigis de S^o L. Marko ke vi interesiĝas je la l-

ingvo Esperanto. Mi esperas ke vi helpos en la disvastigado de la kara lingvo en tiu ĉi lando, kie novaj aferoj ne estas akceptataj rapide.

Eble vi legis la bonan raporton pri Esperanto en la artikolo farita de S^r W. T. Stead en la "Revuo de Revuoj" por tiu ĉi monato.

Kun frata respekto,

Sinjoro B

A

Berlino, 9^{an} de Oktobro, 1901^a.

Kara Sinjoro,

Mi ricevis vian leteron de la 10^a de la kuranta monato kun viaj proponoj pri liveroj kaj la anonco pri viaj specimenoj, kiuj ankaŭ bone alvenis. En aliaj cirkonstancoj, estus malfacile por mi, ĉar mi ne havas motivojn por forlasi miajn kutimajn liverantojn, kiuj kontentigas min. Tamen, ĉar la prezoj kiujn vi prezentas al mi estas iom pli malkaraj, mi mendas de vi, por provo, cent rismojn da papero konforma je la specimeno No. kaj tiom same de No. 2.

Se viaj liveroj estos kontentigaj, kiel mi esperas, mi sendos al vi pli grandajn mendojn.

Por la pago, volu prezentigi kambion al mia kontoro, post tridek tagoj, kun 2 % da diskonto, konforme je viaj kondiĉoj.

Koncerne vian proponon pri dradoj, mi bedaŭras ke mi ne povas profiti ĝin, ĉar mi tute min ne okupas je tiuj komercaĵoj.

Atendante vian avizon pri la sendo, mi prezentos al vi Sinjoro, mian sinceran saluton.

Sinjoro P. Grandaire en Lyon.

J. L.



C... la 2^{an} de Nov., 1901^a,

Sinjoroj,

Ricevinte vian sendaĵon mi devas kun bedaŭro sciigi al vi, ke mi ne trovis ĉiun oleon eteran en kvalito tia, kian mi deziris kaj kian mi povas bezoni. Precipe mi trovis la oleon mentan, koncerne purecon, tiel malbonkvalita, ke ĝia valoro estas tre pli malalta ol la ordinara.

Ĉar la nomita oleo ŝajnis al mi suspektinda, mi decidis fari al ĝi pli zorgan ĥemian analizon, kaj jen mi trovis, entreprenante la sulfvricidan alkoholprovon de Hager, ke la oleo estas falsigita per oleo sasafraza!

Ĉar mi do tian ne povas uzi, mi estas devigita resendi ĝin al vi kaj mi petas samtempe pri tuja nova sendaĵo da pura oleo, ĉar alie mi devos tiun saman aliloke prizorgi.

Atendante vian baldaŭan respondon, mi estas kunestimo.

Via,

Sinjoroj N. N.

O. O.

Amsterdamo, la^{an}ae Februaro, 1902^a.

Sinjoro,

Vian estimatan adreson ni dankas al niaj komunaj amikoj sinjoroj N. N. kaj per tio ĉi ni permesas al ni proponi al vi niajn servojn por vendado kaj aĉetado de... sur tiu ĉi loko.

Ni multe ĝojos, se la nuna letero estos la komenco por korespondado, kiu povas esti utila tiel al vi kiel al ni, kaj ni vin certigas ke en ĉiu okazo ni penos fari ĉion eblan

por la interesoj de niaj estimataj klientoj.

Donante la referencojn sube skribitajn, ni estas pretaj laŭ via deziro sendi al vi niajn kondiĉojn la plej malaltajn kaj ni atendas vian afablan respondon.

Kun alta estimio,

Referencoj:

N. N.

Sinjoroj N. N.

Parizo, la 5^{an} de Aprilo, 1903^a.

Gesinjoroj!

Ni havas la honoron sciigi al la Estimindaj Legantoj de "Korrespondencis" ke ni posedas la literojn specialajn por presi Esperanton, kaj ke ni estas tute arargtaj, por la preso de ĉiuj Leteroj, Cirkuleroj, Broŝuroj, Revuoj, k. t. p., kiujn ili povus bezoni.

Tiujn ni ĉiam presos tre zorge kaj kiel eble plej malkare.

Volu akcepti, Gesinjoroj, nian sinceran saluton.

S. S.

Londono, la 4^{an} de Januaro, 1901^a.

Estimata Sinjoro,

Kiel Esperantisto, permesu ke mi petu de vi la sekvantan seryon.

Sinjoro B ... el X ... posedas ŝipon nomatan Olga, kiu nun prenas ŝarĝon en New-York por tiu ĉi haveco, kaj mi skribas al li hodiaŭ por proponi mian servon kiel ŝipa makleristo.

Ĉar li kredeble ne konas eĉ mian nomon, ĉu vi konplete volus rekomendi min al tiu Sinjoro? Vi povus certigi lin, ke mi tre zorge min okupas je la aferoj de lia ŝipo.

Kun mia antaŭa danko, volu akcepti tre sinceran saluton de

Via,

Sinjoro A

B

Berlino, la 8^{an} de Januaro, 1901^a.

Estimata Sinjoro,

Mi ricevis vian leteron de la 4^a de tiu ĉi monato kaj volonte plenumis vian deziron parolante pri vi al sinjoro B ...; bedaŭrinde mi konas lin tro malmulti, por ke

mia rekomendo povu esti efika. Mi do transdonis vian leteron al unu amiko mia, kiu havas pli oftajn rilatojn kun tiu sinjoro, kaj mi esperas ke per li vi atingos la deziratan celon.

Ĉiam preta por servi al vi, mi restas, tre via, Sinjoro

B

A

Nov-Jorko, la 9^{an} de Februaro, 1901^a.

Estimata Sinjoro,

Mi ricevis ĝiatempe vian leteron de la 4^a de Marto, kaj mi renkontis hieraŭ sinjoron D., kiu varme rekomendis vin kaj petis, ke mi konfidu al vi la aferojn de mia ŝipo Olga.

Ĉar mi havas ankoraŭ nenian agenton en via urbo, mi estas preta akcepti vian proponon; sed mi antaŭe deziras, ke vi konigu al mi vian plej moderan prezon por la ricevo kaj ekspedo de la drita ŝipo.

Se viaj kondiĉoj estas akcepteblaj kaj se mi estos kontentigita de via servo, mi volonte adresos al vi ĉiujn pluajn ŝipojn, kiujn mi poste sendos al via haveno.

Atendante vian baldaŭan respondon. mi subskritas, kun
estimo.

Sinjoro C

D

Parizo, la 2^{an} de Junio, 1902^a.

Estimata Sinjoro,

Aŭdinte ke vi nun havas lokon liberan en via ofic-
ejo, mi per tiu ĉi letero venas, kun la rekomendo de S^o E
..., proponi al vi mian servon, kaj esperas, ke vi favore a-
kceptos ĝin.

Mi estas dudekjara kaj estis jam dum tri jaroj komizo
en la firmo F ... kaj K^e, kies almetita atesto montros al
vi, ke ili ĉiam estis kontentigataj de miaj servoj kaj ke mi
ilin forlasis laŭ propra volo, por serĉi pli profitan situaci-
on. Krom Esperanto mi scias la lingvojn anglan kaj ger-
manan; mi ankaŭ konas la librotendon kaj stenografion.

Atendante la honoron ricevi vian respondon, mi prezen-
tas al vi, Sinjoro, mian respektan saluton.

Sinjoro N

E

Londono, 6^{an} de Junio, 1902^a.

Estimata Sinjoro,

Mi permesas al mi sciigi vin, ke mia reprezentanto S^o G. en la nuna monato havos la honoron prezenti sin ĉe vi, por proponi diversajn komercaĵojn, kiujn mi povas nun liveri en kondiĉoj vere profitaj.

Mi esperas, ke vi lin akceptos kuu via kutima afableco kaj ke vi donos al li kelkajn mendojn, kiujn mi promesas plenumi akurate kaj kontentige.

Kiel ĉiam al viaj ordonoj, mi restas, Tre sincere via,
Sinjoro O M.....

Parizo, en la 15^{an} de Feb, 1902^a.

Al Sinjoroj H. Eriksen kaj K^o, Kristiania. Sinjoroj,

Mi legis en la gazeto Korrespondens ke vi deziras kon-
toriston, kiu, krom librokonduko, komprenas la francan li-
ngvon kaj la lingvon internacian Esperanto.

Mi posedas la deziratajn sciojn kaj tial mi permesas al mi
proponi al vi mian servadon por la vakanta loko (okupado).

En la tempo de tri jaroj mi estis okupata en la instituto

de komereĉinstruisto, direktoro Hermod. Sinjoro Hermod donos al vi ĉiujn informojn, kiujn iel vi deziras tŭsante mian konduton kaj taŭgecon. Ĉetere mi vin certigas, ke mi penados meriti vian kontenton per ĝusta plenumado de miaj devoj.

Atendante vian bonvolan respondu, mi havas la honoron esti.

Via humila servaĉo,

P.....

Bombe'o, 6^{an} Februaron, 1903^a.

Al S-roj Scott & Mc Dowell, Glasgo Karaj Sinjoroj.

Konfirmante nian leteron datitan 17^{an} lastan monaton, ni petas vin nun akcepti al scio ke ni subskribis kontraŭ vi, per la ordono kaj por la kalkulo de S-roj. Lapis Fratoj, Milano, unu kambion laŭ la sekvantaj detaloj:—No, 789.

£ 321 : 10 : 0 Post 3 monatoj. Ordono : — Grindley & May.

Ni enmetas unu kopion de la fakturo pri la komercaĉoj

enŝipigitaj pri kiuj ni subskribis la kambion : dua kaj tria kopioj sekvos per la plej proksima poŝto.

Rekomendante nian kambion al via atento, ni estas,

Viaj,

Law & Rée.

Lyon la 10^{an} de Marto, 1902^a.

Sinjoro,

Kun la rekomendo de honorinda negocisto de via regiono, mi permesas al mi adresi al vi mian prezaron ĝeneralan kaj samtempe kelkajn specimenojn de la vendobjektoj paperaj kaj kartonaj, kiujn mi havas ordinare en mia magazeno. Mi esperas ke vi ŝatos la kvaliton tute rimarkindan de la komercaĵoj kiujn mi proponas al vi, kaj ke la kondiĉoj profitaj, je kiuj mi povas liveri ilin al vi, decidigos vin doni al mi viajn mendojn.

Vi povas ankaŭ vidi en mia katalogo, ke, krom la paperoj, mi ankaŭ makleras pri ĉiuj komercaĵoj de la urbo Roubaix, speciale pri drapoj kaj teksaĵoj ĉiuspecaj. Miaj mahovaj kaj konstantoj interrilatoj kun ĉiuj firmoj ĉitieaj

donas al mi la eblon trakti la negocojn de miaj mendantoj kun la tuta kompetenteco dezirinda kaj per tia maniero, ke ili estu plene kontentaj.

Esperante ke vi favoros min per viaj mendoj, mi petas, Sinjoro, ke vi akceptu mian sinceran saluton.

P.

第五篇 字彙

A.

世界語	英文	中文
a,	區別詞之尾聲.	
atelo,	bee,	蜜蜂.
abio,	fir,	杉,松.
acero,	maple,	楓樹.
acida,	acid, sour,	酸.
aĉeti,	to buy,	買.
ad,	表動作繼續之意.	
adepto,	adept,	熟練者
administri,	administrate,	管事.

adiaŭ,	adieu, good-bye,	請安語.
aero,	air,	空氣.
afero,	affair, business,	事.
aglo,	eagle,	鷹.
agrabla,	agreeable,	合意.
aĝo,	age,	年歲.
ajlo,	garlic,	蒜.
ajn,	ever,	不論.
aĵ,	表含某性質之物.	
akcento,	accent,	重聲之號.
akcipitro,	hawk,	鷹.
akompani,	accompany,	跟隨.
akra,	sharp,	利.
akrido,	grasshopper,	蚱蜢.
akurata,	accurate, punctual,	確實的.
akvo,	water,	水.
al,	to,	於.
alaŭdo,	lark,	百靈鳥.
albumo,	album,	書畫譜.
alia,	other,	別,他.

alkovo,	alcove,	花廳
almenaŭ,	at least,	至少
almozo,	alms,	賑濟
alta,	high,	高
alumeto,	match,	火柴
amo,	love,	愛
amaso,	crowd, mass,	衆人
ambasadoro,	ambassador,	公使
amelo,	starch,	漿汁
amiko,	friend,	友
amuzi	amuse,	娛樂
an'	表其所屬之人民	
anaso,	duck,	鴨
angulo,	corner, angle,	角,隅
anĝelo,	angel,	天使
animo,	soul,	靈魂
ankaŭ,	also,	亦
ankoraŭ,	yet, still,	仍,亦然
ankro,	anchor,	鐵錨
anonci	announce,	報告

ansero,	goose,	鵞.
anstatai,	instead of,	代替.
anta,	表方事之意.	
antaï,	before,	以前.
aparti,	separate,	分離.
aparteni,	belong,	屬.
apenaï,	scarcely,	稀少.
aperi,	appear,	顯出.
apogi,	lean,	倚靠.
aprobo,	approbation,	嘉納.
apud,	near by,	近.
ar'	表凡最之意.	
araueo,	spider,	蜘蛛.
arançi,	arrange,	排列.
arbo,	tree,	樹.
arço,	low (fiddle)	弦.
ardeo,	heron,	青鷺.
argilo,	clay,	泥.
arçento,	silver,	銀.
argumento,	argument,	理由,主意

arko,	arch, low,	弧線.
arseniko,	arsenic,	砒石.
arto,	art,	工藝.
artiko,	joint,	關節.
as,	動詞之現在尾聲.	
asparago,	asparagus,	天門冬屬.
ata,	柔聲兩用式之現在尾聲.	
ataki,	attack,	攻擊.
atendi,	wait, expect,	待, 期望.
atenti,	attend,	注意.
atesti,	attest, affirm,	證明.
atingi,	attain, reach,	至, 到.
aŭ,	or,	或.
aŭdi,	hear,	聽.
aŭskulti,	listen.	傾耳.
aŭtino,	fall (of the year),	秋.
avo,	grandfather,	祖.
avara,	covetous,	貪慾.
aveno,	oats.	燕麥.
azeno,	ass,	驢.

azoto,	azote, nitrogen,	淡氣.
B.		
babili,	chatter,	閒談.
baki,	bake,	焙, 燒.
balai,	sweep,	打掃.
balanci,	balance, swing,	平均.
balbuti,	stammer,	吃舌.
baldaŭ,	soon,	早.
baleno,	whale,	鯨.
bano,	bath.	洗澡.
bapti,	baptize,	洗禮.
bari,	bar, obstruct,	防碍.
barbo,	beard,	鬚.
barelo,	keg, barrel,	小桶.
bastono,	stick,	杖, 竿.
bati,	beat,	打.
btali,	fight,	攻打.
bedo,	bed (garden),	一幅園地.
bedaŭri,	pity, regret,	可惜.

beko,	beak,	鳥 嘴
bela,	beautiful,	佳
beni,	bless,	祈 福
benko,	bench,	坐 席
bero,	berry,	珠 果
besto,	beast,	獸
betulo,	birch,	樺 樹
bezoni,	need, want,	欲
biciklo,	bicycle,	自 行 車
bieno,	goods, estate,	財 產
biero,	beer,	麥 酒
bindi,	bind (books),	釘
birdo,	bird,	鳥
blanka,	white,	白
bleki,	cry (of beasts),	獸 啼
blinda,	blind,	瞽
b'ovi:	blow,	吹
blua,	blue,	藍
bo,	姻 親 對 待 之 人	
boli,	boil,	沸 騰

boligi,	to boil,	煮.
bona,	good,	佳.
bori	bore,	穿過.
bordo,	shore,	岸.
borso,	bourse, exchange,	公所, 會館.
boto,	boot,	長靴.
botelo,	bottle,	瓶.
bovo,	ox,	牛.
brako,	arm,	臂.
bramo,	bream,	鯽魚.
branço,	branch,	枝
